Inter Kristnasko kaj Novjaro, la 27an de Decembro, mi havis la honoron kaj plezuron esti unu el proksimume 75 prelegistoj pri internaciaj aferoj, kiuj ĉeestis konferencon en la Ŝtata Departemento en Washington. Lia Ŝtatssekretario Moŝto Edward R. Stettinius diris al ni impresajn vortojn pri la graveco de bone informita publika opinio kaj pri la rolo, kiun prelegoj povas ludi en la informado kaj evoluigado de publika opinio favore al mondpaco kaj internacia organizo. Kelkaj el liaj plej eminentaj kunlaborantoj donis al ni detalajn klarigojn pri la proponoj de Dumbarton Oaks kaj aliaj internaciaj problemoj. Inter tiuj, kiuj paroladis, estis la Helpaj Ŝtatssekretarioj, Archibald MacLeish (pri kies rolo S-ro Connor skribis en la redaktora paĝo de AE), Nelson Rockefeller, Dean G. Acheson, William L. Clayton, William E. Dunn; la specialisto de la Ŝtata Departemento pri internacia organizo, Leo Pasvolksy, la konsilisto pri juraj problemoj, Green W. Hackworth, kaj aliaj. Generalo M. S. Fairchild kaj Admiralo Russell Wilson klarigis kelkajn el la militaj aspektoj de la plano de Dumbarton Oaks.

Oni permesis al ni prelegistoj bombardi tiun imponan galerion de altrangaj oficistoj de la Ŝtata Departemento per demandoj. Mi ne diros, ke ni ricevis kompletan respondon en ĉiu kazo. Tio estis

neebla, ĉar kelkaj el la demandoj estis tre nediskretaj kaj provokaj, kaj la Ŝtata Departemento scias protekti siajn sekretojn. Tamen multaj gravaj problemoj fariĝis multe pli klaraj al ni. Kelkaj el ni pensis, ekzemple, ke Internacia Polica Trupo estus preferinda al la sistemo de militaj kontingentoj, kiun la dokumento de Dumbarton Oaks proponas. La konferenco de Washington ne ŝanĝis nian opinion pri la preferindeco de Internacia Polica Trupo, sed ĝi certe ŝanĝis almenaŭ mian opinion pri la ebleco starigi efikan internacian policon en la proksima estonteco.

La mondo de Dumbarton Oaks ne estos perfekta mondo. Paradizoj ne estiĝas el la detruo kaj malamo de milito. La nacioj estas nur duone pretaj subordigi sin al internacia aŭtoritato. Reciproka suspekto kaj ĵaluzeco ekzistas eĉ inter la Unuigitaj Nacioj. La proponoj de Dumbarton Oaks estas en multaj punktoj la maksimumo atingebla en ĉi tiu momento. La oficistoj de la Ŝtata Departemento estas tre fieraj pri la usona influo en la formulado de la proponoj. Studinte la proponojn kaj la kritikojn de ĉiu vidpunkto, mi venis al la konkludo, ke ili estas pravaj. Dumbarton Oaks estas nur komenco por la konstruado de tutmonda ordo de paco kaj justeco, sed ĝi estas bona komenco.

La proponoj estas nur proponoj en ĉi tiu momento. Ŝanĝoj kaj pli-

bonigoj estas eblaj kaj dezireblaj. Sed sugestoj por blibonigo devas esti bazataj sur realista kompreno de la situacio. Usono estas grava potenco en la mondo, sed ne povas en ĉio realigi siajn proprajn dezirojn. En kelkaj punktoj kompromiso inter Usono, Britujo, Rusujo kaj la aliaj ŝtatoj estas la sola praktika eliro el dilemo.

En multaj rilatoj la plano de Dumbarton Oaks similas al la Ligo de Nacioj. Kompare al la Ligo, kelkaj el la proponoj estas sendube plibonigoj. Ekzemple la aranĝo, ke ne ekzistos unu Konsilantaro kompetenta pri ĉio, sed unuflanke Sekureca Konsilantaro, kiu estas kvazaŭ polica aŭtoritato por eviti aŭ ĉesigi militojn, kaj aliflanke la Ekonomia kaj Sociala Konsilantaro por la pozitiva laboro, estas granda progreso. La kritikantoj prave diras, ke la Sekureca Konsilantaro ne estos tute demokrata kaj ke milita potenco-politiko estos ebla en ĝi. Tio estos neevitebla en la komenco. Sed oni ne forgesu, ke la pozitiva agado estas same grava aŭ pli grava ol la negativa. La proponita Ekonomia kaj Sociala Konsilantaro estos la plej demokrata organo, kiun oni povas imagi. Kial ne atenti tiun gravan fakton?

Tiuj, kiuj deziras starigi Federan Union, Mondfederacion, Mondregistaron, Homaran Parlamenton, rajtas pensi, ke la proponoj de Dumbarton Oaks estas tro modestaj. Sed ili devus konfesi, laŭ mia opinio, ke, se iliaj prop-

raj planoj ne estas realigeblaj nun, Dumbarton Oaks estas almenaŭ unu paŝo sur la ĝusta vojo. Prezidanto Roosevelt avertis en sia lasta parolado kontraŭ la "perfektismo", la sinteno de personoj, kiuj volas "ĉion aŭ nenion". Tiu sinteno estas grava danĝero. En la internacia vivo oni progresas nur "paŝo post paŝo, post longa laboro", por uzi la vortojn de D-ro Zamenhof.

La "perfektismo" estas ankaŭ danĝera en la klopodoj por la enkonduko de Esperanto en la internacian vivon. Kelkaj Esperantistoj revas, ke iun tagon en la proksima estonteco internacia aŭtoritato diros simple: Depost ĉi tiu tago Esperanto estos la oficiala interlingvo de la internacia vivo. Tio estas iluzio. Ni rajtas esperi, ke la Unuigitaj Nacioj (tio ja estos la oficiala nomo de la internacia organizo) uzos Esperanton por kelkaj el siaj oficialaj publikigaĵoj, ke oni faros oficialajn raportojn pri Esperanto (simile al la raporto de la Ligo de Nacioj), ke oni faciligos internaciajn akordojn pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn ktp. La definitiva venko de Esperanto venos "paŝo post paŝo, post longa laboro", post longa laboro ne de aliaj, sed de ni Esperantistoj. Ni devas montri, ke Esperanto *servas* en la internacia vivo, ne nur por la Esperanto-movado mem, sed por la internaciaj rilatoj ĝenerale. Iu cinikulo iam diris, ke la Esperanto-movado estas vapormaŝina segejo, kiu segas la lignon, per

kiu ĝi mem estas hejtata. Kelkfoje oni emas pensi, ke li ne estis tute malprava. Kompreneble kelkfoje jam estas sukceso, ke la movado restas vivanta, preta por plivastiĝi, kiam novaj cirkonstancoj venos. Tiaj novaj cirkonstancoj estas ve-

nantaj nun. Jam estas tempo por komenci grandskalan plivastigon de la Esperanto-movado kaj praktikan uzon de Esperanto en la internacia vivo. Praktikaj sugestoj pri tio devus ofte aperi en la Esperanto-gazetaro.

IRLANDA VIDPUNKTO

“MONDPACO PER MONDŜTATO?”—DE VALERA

Resumo de LORCAN O HUIGINN en “Irlando Vokas”

S-ro Éamon de Valera, la Ĉefo de la Irlanda Registaro, parolis ĉe kunveno en Dublina Universitato (1. Nov. 1944) okaze de prelego de S-ro M. B. Yeats pri “La Malgrandaj Nacioj”. S-ro de Valera kunsentis kun la suferantaj nacioj malgrandaj, kaj diris: “Kiel povas la rajtoj de la malgrandaj nacioj akordi kun la neceso por daŭra paco? Mi ne esperas pri la baldaŭa solvo de tiu demando ĉar en nunaj cirkonstancoj ŝajnas neeble konstrui organizon kiu povus garantii pacon eĉ sen solvo de la problemo, samtempe lasi al la malgrandaj nacioj la liberecon necesan por la aparta nacia vivo.

“Mi opinias, ke la sola solvo por monda paco kuŝas en la starigo de federita mondŝtato aŭ mondaŭtoritato, kiu disponus pri sufiĉe da povo por kontraŭstari militemecon. Tia centra aŭtoritato (kun plena povo kaj armiloj) estus pli bona solvo, por la malgrandaj nacioj, ol la nuntempaj proponoj. Oni devus doni al tiu aŭtoritato sufiĉe da ‘polica povo’ por insisti pri la observado de la leĝoj de la Mondparlamento. La demokrata karaktero de la Ligo de Nacioj iomgrade kaŭzis ties senpovecon, kiam agado estis necesa en pasintaj tempoj.

Sed nun oni svingas al kontraŭa ekstremo, proponante maldemokratian koncentrigon de povo je la potencaj nacioj. Tio, mi opinias, rezultos en kvereloj inter tiuj potenculoj, aŭ en malsimilaj planoj pri politika agado, kiel okazis ĉe la Ligo de Nacioj.

“Nuntempe, do, estas espereble garantii, ne pacon sed interrompon de militado. De vidpunkto de la malgrandaj nacioj, mi preferus la Ligon, kiu siatempe havis la eblecon esti reale efikoplena: tiel ĝi ne estis, tamen, ĉar oni hezitis ekkomenci militagadon kontraŭ leĝrompantaj nacioj.

“La Nacioj Malgrandaj ja estas la ‘salo de la tero’, ties influo por la homa bono estas facile rekonebla kaj el ili devenas multo altvalora en nia civilizo. Eĉ se mondŝtato povus havigi al ni la mirindan donacon de Paco,” daŭrigis S-ro de Valera, “mi ne ŝatus vidi la mondon fariĝi unu mondema materiema ŝtatego. Kontraŭe, mi ŝatus vidi la malgrandajn naciojn en iliaj prapatraj landoj, por ke tiuj popoloj evoluu laŭ la naciaj trajtoj, kulturo kaj ekonomio. Mi forprenus de ili nur tion kion ili devus esti pretaj forcedi — la rajton ataki la najbaron.”

—“Irlando Vokas”

SURVOJE AL HOMARA PARLAMENTO

HAROLD S. BIDMEAD

En sia parolado je la vespero antaŭ la tago de Sankta Andreo, Ĉefministro Winston Churchill parolis pri la neceseco de "internaciaj organoj . . . kiuj devas esti fabrikataj, se la libera vivo de Eŭropo iam ajn restariĝu kaj se la teruraj konfliktoj, kiuj disŝiris la Eŭropan civilizon, estu malhelpataj detruiri denove la mondpacon". Li aludis, ke tiuj institucioj devus esti kreataj dum la finaj militfazoj kaj tiel esti uzataj por rapidigi la ĉeson de la militado. La lasta populara skribaĵo de Profesoro George Catlin, "Angla-Amerika Unio kiel kerno de Monda Federacio" (Federa Traktaĵo n-ro 8, Macmillan) pritraktas ĝuste tiun problemon. La aŭtoro klare vidas, ke ni nun devas prepari nin kontraŭ ĝenerala tendenco al izolemo post la milito, same en Britujo kiel en Usono. Britaj vivesencaj interesoj centras en Usono, same kiel la sorto de Ameriko estas forte ligata kun la bonstato en la cetera mondo. Federacio, li argumentas, estas la plej bona rimedo por garanti ke Onklo Sam ne denove forturnos sin de siaj moralaj devoj tuj post la ĉeso de pafado.

Estas granda danĝero, ke oni konsideras federacion ne kiel tuja celo sed kiel postmilita, postpafadĉesa, paccelo. Dr. Catlin aliflanke insistas, ke tiuj el la "Unuiĝintaj" Nacioj kiuj povas fari tion, komencu jam nun per "praktika ekzemplo" de federa unio. Li opinias, ke "la plej grava el ĉiuj danĝeroj estas ke nenia komenco estas farata. . . . Estas senvertebre, paroli pri io kiel "neevitebla" dum ni faras nenion aktivan por efektiviĝi ĝin. . . . Ne sufiĉas diri kun manoj falditaj surstomake 'La registaro faros ĉion.'" Kun la ĉefministro li esperas pli intiman dummilitan firmiĝon de la Unuiĝintaj Nacioj. Li konsilas kiel la unuaj paŝoj komunan aŭ reciprokatan ŝtatancon almenaŭ inter la Brita

ŝtataro kaj Usono kaj Militkonsilantaron por la nova unio "kiu pli kaj pli ĝuos la veran suverenan aŭtoritaton en ĉiuj aferoj ne estantaj tiuj de 'ŝtataj rajtoj' aŭ de grandskalaj lokaj registaroj." Tio signifas, kompreneble, ke la federa povo ne superos la memstarecon de iu lando aŭ la suverecon de naciaj parlamentoj en siaj naciaj sferoj; tio estas la esenco de federalismo.

Lastatempaj evoluoj montris la urĝan necesecon por Plej Alta Politika Direktantaro por la Unuiĝintaj Nacioj, kaj la federo de almenaŭ la Brita ŝtataro kaj Usono, kiel konsilata, estus granda paŝo en la bona direkto. Estas vere malkvietige, ke tiom da ekonomia kaj milita maŝinaro estas permezata gvidi inter-liganan aferon sen ekzisto de efika politika kontrolo. La politikaj malagrablaĵoj de la liganoj en Nordafriko estis karakterizaj por sistemo, en kiu improvizita politika aŭtoritato, ĉar ĝi estas ne organa, neeviteble trovas siajn funkciojn uzurpataj per la pli alte organizita milita maŝinaro. Flanke dirite, tio estas la kaŭzo, ke ĉia plano por meti potencon malantaŭ la Ligo de Nacioj metus la mondon sub la potencon de la plej granda milita despotismo de la historio. Kiamaniere oni metu demokratian kontrolon malantaŭ la potencon malantaŭ la Ligo, estas problemo, kiun ligo povus nur solvi ĉesante esti ligo. D-ro Catlin proponas organan union, ne malorganan improvizacion, kies influo povus fari multon por sekurigi ke la Ligo estu malpli katastrofe senefika ol en la pasinteco.

"Ni ne deziras nuran Ligon," diris Generalo Smuts antaŭ nelonge, "sed ion pli fortan kaj organan, eĉ se komence ĝi estas pli limigita kaj malpli ambicia ol la Ligo."

La libro estas pli praktika ol teoria. Tiuj legantoj, kiuj havas malmultan

scion pri federaj principoj, legu ĝin kune kun traktaĵo numero 4 ("Kio estas Federa Regado?" de K. C. Wheare), alie povus okazi, ke la argumentoj estus malfeliĉe miskomprenataj.

La aŭtoro priskribas sin mem kiel "ne unu el tiuj kredantaj, ke la morto de entuziasmo estas la naskiĝo de saĝo." Tiuj kiuj legas tiun verkon kaj la pli fruan de la aŭtoro, precipe "Unu Angla-Amerika Nacio", verŝajne konsentos, ke post preskaŭ du-dek jaroj la entuziasmo de D-ro Catlin kreskis dum lia saĝeco iĝis pli vaste aplaŭdata. Li citas longan liston de influplenaj subtenantoj por lia

plano kaj por similaj planoj. Tiu subteno, li esperas, montrus sin kiel "kreskanta vento forblovonta tutajn arbarojn de morta ligno".

Ĉiuj havantaj intereson pri internaciaj aferoj nepre legu tiun libreton, precipe tiuj eble favorantaj rivalajn planojn, ĉar ili lernos kiamaniere esti entuziasmaj ne iĝantaj dogmemaj. Pli grave ankoraŭ, la libro helpos gajni eĉ pli vastan akcepton por la kredo, ke demokrataj popoloj, kiuj solaj estas kapablaj efektiviĝi veran internacian reĝistaron inter si mem, havas sanktan devon fari la unuajn paŝojn survoje al demokrata federa ŝtataro en la kaŭzo de mondpaco.

NEW BOOK: "THE GREEN STAR"

Published by the Author, *Joseph W. Dubin*, 34 South 16th Street, Philadelphia 2, Pa. The announced price is \$2.50.

This well printed and illustrated book of 281 pages, just off the press in January, is the most complete discussion of the interlanguage problem from the Esperantist viewpoint that has appeared in the United States in many years. Sample titles from among the thirteen chapters are: "An Ideal is Born," "Give Us Unity," "It Must Be Done," "It Happened Like This," "The Green Star Shines," "Esperanto at the Peace Table". The style is popular and chatty, with a wealth of jest and anecdote; thoroughly entertaining, at the same time convincing.

In a few places, where Mr. Dubin dwells on his own views as to the best approach to world unity and peace on the political side, not all will agree 100%, but all will recogn-

ize the sincerity of conviction. A few inadvertant slips in dates or language will be overlooked in a work involving so much research. In the Esperanto "Key" forming Appendix I, it seems unfortunate that the writer hit upon *money* as the word from which to learn the Esperanto sound of "O"; for to most United Statesians that will suggest not the true "O" sound, but a very different sound known as "short-U" found in *sun*.

The Green Star is an effective presentation of truths very important for the world. If a hundred thousand Americans would read *The Green Star* attentively, there would be a hundred thousand people much better posted on one of the livest questions of the present age.

—E. G. D.

TO OUR MEMBERS AND SUBSCRIBERS: *We are starting a campaign to double the subscription list of the "American Esperantist." Join in! We can enlarge and improve our journal if everyone will ask his friends to subscribe.*

LEGENDO DE LA KOLIBRO

DORIS TAPPAN CONNOR

La kolibro estas la birdo de Ameriko. En ĉiu lando de la Nova Mondo estas specoj de tiu mirinda birdeto. En Brazilo oni nomas ĝin la *Beija-Flor* (beĵa-flor), aŭ Esperante la *flor-kisanto*. En Brazilo estas pli ol ducent-okdek specoj de la flor-kisanto. Multaj indianaj gentoj tre adoras la kolibron. Ĝi estis eĉ la Dio-Birdo de unu gento. Mi rakontos al vi nun la legendon pri la origino de tiu mirinda birdeto:

Potí signifas en la Gvarania lingvo *floro*. (La *Guaraní* estas indiana gento en Brazilo kaj Paragvajo.) En la pratempo, tiu nomo estis ankaŭ la nomo de tre bela indiana fraŭlino, kies lipoj estis dolĉaj kiel la nektaro de la floroj en la arbaro. *Potí* amis junulon kies nomo estis *Guanumbi*. Li apartenis al malamika gento de indianoj. Inter la amerikaj indianoj — kiel inter la indianoj de aliaj landoj en la mondo — oni ne permesas amon inter personoj de malamikaj gentoj. Do, *Potí* kaj *Guanumbi* povis renkonti unu la alian nur en sekreta loko.

Je krepusko, kiam la suno estis preskaŭ preta por dormi, la geamantoj renkontiĝis en la arbaro, apud gaja rivereto. Ili povis esti kune nur dum kelkaj minutoj, ĉar se ili restus pli longe la gento de *Potí* suspektus ion. Amiko de

Potí — malfidela amiko, malamiko eĉ — malbela, envia — elkovris la sekreton de la junulino, kaj rapidis por raporti al la ĉefo de la gento. Sekvis ke *Potí* kaj *Guanumbi* ne plu povas renkontiĝi en la arbaro.

La Luno vidis la malĝojon de la indiana junulo, kaj diris al li unu nokton: "Hieraŭ mi vidis la fraŭlinon *Potí*. Ŝi multe ploris, ĉar ŝi devis edziniĝi kun indiano de sia propra gento. Fine ŝi turnis sin al *Tupá*, la Spirito de la Bono, kaj plore petis ke la Spirito permesu ke ŝi mortu, aŭ ke la Spirito faru ion—ion, ĉar ŝi ne amas la edzon. *Tupá* aŭdis la preĝon de *Potí*; la Spirito ne permesis ke ŝi mortu, sed transformis ŝin en floron. Mia amiko, la Vento, diris tion al mi."

"Diru al mi, Luno, kia floro mia amatino nun estas?" petis *Guanumbi*.

"Ha, mia junulo, tion mi ne scias. La Vento ankaŭ ne scias."

"*Tupá*, *Tupá*," lamentis *Guanumbi*, "mi scias ke en la petaloj de *Potí* mi rekonos la dolĉecon de ŝiaj kisoj. Mi *devas* trovi ŝin. Helpu por ke mi trovu ŝin, Vi, kiu povas fari ĉion."

Antaŭ la leviĝo de la Luno, la korpo de *Guanumbi* komencis malgrandiĝi, velkis ĝis li estis eta, delikata, mult-kolora birdeto, kiu

forflugis tre rapide. Estis la *flor-kisanto*, tiu mirinda, amerika birdeto. Dum la tuta tago kisas espere kaj senspire la lipojn de la floroj, kaj serĉas por unu — *nur unu*. Sed (oni diras) ĝis nun li ne trovis sian amatinon.

Depost tiu punkto la malĝoja amanto, en tiu bela metamorfozo,

Friendly Tips for Students:

1. As you have probably learned, we can say in Esperanto: *renkonti unu la alian* (to meet one another); or we can make use of the little suffix *-iĝ-* (iĝi, to become) and say *renkontiĝi*, and mean the same thing! Note also: *edziniĝi* (to become a wife), and *malgrandiĝi* (to become small).
2. In English we always have to use an impersonal *it* before the verb in such phrases as: *It followed*; *It is raining*. There is always a force that causes things, so our English indicates. But in Esperanto, as in some other languages, we never use *ĝi* to translate such a sentence. We use only the verb: *Sekvis* (It followed . . .); *Estis la flor-kisanto* (It was the humming-bird); *Pluvas* (It is raining). *Interese, ĉu ne?* (It is interesting, isn't it?)
3. Here is a new point — maybe! In sentences where the conjunction *ke* is used after words that imply order (*ordono*), entreaty (*peto*), wish (*volo*), intention (*intenco*), we use the "u" form of the verb: *Si petis ke la Spirito permesu . . .*, *ke la Spirito faru ion . . .*, *La Spirito ne permesis ke ŝi mortu . . .* And the expression *por ke* is always followed by the "u" form of the verb: *Helpu por ke mi trovu ŝin*.

URGENT NOTE FROM THE EANA SECRETARY

My work is of such a nature that many of our readers may think they have been sadly neglected. I cannot blame them. I have absolutely no help, and mail piles up at rate of 10 to 40 letters daily. I open all mail, and if money is enclosed I record it at once, write receipt, and put letter aside for response later. But I do not seem able to catch up with that "LATER."

Before the war I usually devoted from 8 to 12 hours a day to EANA affairs. But since July 1942, war work calls for at least 15 hours daily; leaving me little time for EANA. So dear readers, try to be patient. Your "Office Boy" is doing the best he can. EANA correspondence is usually done at home, after I return from work, and as I am in EANA office but a few minutes, between 7:30 and 9 a.m., visitors seldom see me.

Make checks or money orders payable to Esperanto Association of North America, 1410 H St., N. W., Washington 5, D.C. If you do not receive your order within 2 weeks, notify me — do not wait longer. Be sure to enclose check or money order. I receive letters saying "enclosed find" but nothing is enclosed. A letter usually follows with the missing "enclosed", which had been forgotten in first letter. *Please, please — it's embarrassing.*

Regretfully — but cordially JOS. LEAHY, Sec'y EANA

MALLONGA HISTORIO DE ESPERANTO

VERKITA DE ERNEST DODGE

Redaktista Noto: Jen estas la fina parto el historia serio pri Esperanto, en kvar sinsekvaj partoj.



SEPA PERIODO

1926-1934

Tiu ĉi periodo preskaŭ povus kunfandiĝi kun la antaŭa epoko, 1920-1926. Tamen la publikigo en 1926 de la Sankta Biblio — plej grava monumento de la lingvo zamenhofa — kaj la samjara decido de la Universala Telegrafa Unio akcepti Esperanton kiel la sole rajtigitan internacian lingvon (krom la latina), ŝajnas sufiĉe gravaj mejloŝtonoj sur la Esperanto-vojo.

La okjaro 1926-34 daŭrigis la progreson. Sed eble la progreso iom malrapidiĝis pro la tutmonda financa krizo de 1929.

Elstara aspekto de la sepa periodo estis la plivastigado de la konversacia Cseh-metodo de Esperanto-instruado, kulmininta je fondo en 1930 de la Internacia Cseh-Instituto en Nederlando. Plua elstara aspekto de la periodo estis pluflorado de Esperanta literaturo, precipe per la publikaĵoj de *Literatura Mondo* en Budapeŝto. Ĉe la fino de tiu periodo aperis tre monumenta verko, *Enciklopedio de Esperanto* en du volumoj.

La turisma uzo ankaŭ kreskis. En 1930-32 S-ro Joseph Scherer, svise naskita usonano, rondvojaĝis la terglobon. Li paroladis Esperante pri geografiaj temoj ĉe uni-

versitatoj k.t.p. en 41 landoj, ĉiam kun la helpo pri traduko kaj aranĝo de la lokaj Esperantistoj.

Tre menciinda estas ankaŭ disvastigo de Esperanto kiel ilo de solidareco inter la laboristaj klasoj tutmondaj, kiu komenciĝis 1919-21 sed plej floradis en la sepa periodo. Ilia ĉefa organizo (Senacieca Asocio Tutmonda) havis proprajn kongresojn, kaj iam ĝi rivalis je nombreco la organizojn de la ĝenerala (nepolitika) Esperantistaro. Al la SAT organizo Esperantistoj ŝuldas aperigon de la plej bona vortarlibro, *Plena Vortaro de Esperanto*.



OKA PERIODO

1934-1939

Jam en 1934 la hitlera reĝimo komencis subpremi Esperantan agadon en Germanujo. Jaron-post-jare la hitlera kontraŭstaro plintensiĝis. Fine S-ro Teo Jung devis fuĝi el Germanujo kaj translokigi la ĵurnalon *Heroldo de Esperanto* en Nederlondon. Depost tiu momento la ombro de proksimiĝanta konflikto kuŝis reze sur Esperantistaj koroj ĉie. Estas kulpo de la tempo — ne kulpo de la Esperantistoj — ke tiu kvinjaro vidis en Germanujo kaj Aŭstrujo malprogreson.

Tamen progreso okazis en kelkaj kampoj, plej elstare en Esperanto-uzo ĉe radiotelefonio. Ankaŭ komenco de ĝia uzo en sonbildaj filmoj. Kaj uzo de Esperanto fare

de la skoltoj en multaj landoj tre floris. Eĉ plue, ĝia uzo por blinduloj.

En 1937 okazis ne nur la Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio, sed en Parizo la granda "Konferenco pri Esperanto en Moderno Vivo". Tiu frappe montris la multflankecon de la enradikiĝo de Esperanto: en la komerca, turista, scienca, kaj religia vivo.

Pluraj registaroj komencis montri pli favoran sintenon je Esperanto ol iam antaŭe. Precipe en Brazilo okazis tre signifa subteno de Esperanto, fare de la registaro.

Tre monumenta verko aperinta en tiu periodo estis *Plena Gramatiko de Esperanto*, verkita de Kalocsay (hungaro) kaj Waringhien (franco).



NAŬA PERIODO

Depost 1939

Valoras kompari, je Esperanta vidpunkto, la nunan militon kun tiu de 1914-1918. El la komparo nepre elvenos pruvo de la pli granda disvastiĝo kaj pli solida staro de Esperanto nun ol tiam. Nur en persona helpo de samideano al samideano la tiamaj Esperantistoj egalas kaj eble superis la nunajn. La pli severa, pli senkompata karaktero de la nuna konflikto, ĉe la hitleranoj kaj japanoj, faras personan helpon al Esperantistoj en okupitaj landoj multe pli malfacila ol tiam. Sed ĝenerale oni povas konstati ke la nuna milito ne batis Esperanton tiom severe kiom faris la antaŭa.

Tiam preskaŭ tute ĉesis eldonado de oficialaj organoj de la Esperantistaro, — kun escepto de la gazeto *Esperanto* en Genevo. Nun, krom *Esperanto Internacia* kaj la *Jarlibro de I.E.L.*, regule aperas organoj de pluraj Esperantaj landasocioj, — plej menciindaj: *British Esperantist*, *Argentina Esperantisto*, *O Brasil Esperantista*, *Heroldo de Ĉinio*. Kaj *Amerika Esperantisto* plibeligiĝis je formato kaj enhavo.

Plej kuraĝiga estas la fakto ke Internacia Esperanto-Ligo, pro lerta mastrumado, daŭre funkcias sen deficito, eĉ fierante pli bonan financan staton nunjare ol antaŭe. Tre kuraĝiga ankaŭ, kaj eĉ miriga, estas la fakto ke en pluraj landoj la landasocioj kaj ĝenerala loka agado eĉ pli firme floradas nun dum milito ol antaŭe dum paco. Precipe la jenaj: Brazilo kaj Argentino en Sud-Ameriko; Anglujo kaj Svedlando en Eŭropo; Aŭstralio en la Pacifiko; kaj eĉ en Usono kie la movado neniam estis tiom forta kiom en pluraj aliaj landoj. En militanta Ĉinujo oni daŭre uzas Esperanton en gazetoj kiel "voĉon aŭdeblan en la eksteran mondon". Ĉu oni bezonas pli klaran pruvon ol la supraj ke Esperanto ja vivas kaj jam fariĝis movado influhava kaj tre vivkapla?

Kun espero, ni preĝas alvenon de la deka periodo de Esperanto, kiam paco estos reveninta al la nun sufereganta mondo!

(FINO)

La Esperantistoj Hispanaj de Nov-Jorko ("Esperantistas Hispánicos de Nueva York") ricevis gratulleteron pri ilia bela 32-paĝa broŝuro de Generalo Mangada, kiu skribis el Meksiko: "Ĉiuj, kiuj vidis la broŝuron, estis same mirigataj kiel mi, antaŭ ĉiuj Samideano Lanti, kiu estas specialisto en tiaj aferoj" S-ro Floreal Conchado, Prezidanto de la grupo, skribis: "Nun mi laboras pri la enkonduko de Esperanto en la hispanan lernejon de Brooklyn. La lernejo havas pli ol 500 membrojn kaj pli ol 200 lernantojn. . . . La estraro de la lernejo estas tre favora al Esperanto kaj volas, ke mi komencu Esperantokursojn. . . . Kiam la malbona vetero malaperos, mi malfermos la kurson."

★

En "Jurnalo de Modernaj Lingvoj" ("Modern Language Journal") de Novembro 1944 Profesoro Mario A. Pei publikigis detalan recenzon pri "The Loom of Language" de Hogben-Bodmer kaj "Interglossa" de Hogben. Li favore mencias Esperanton. Lia juĝo pri "The Loom" similas tiun de D-ro Solzbacher en A.E. Pri la stranga grek-latina lingvo-projekto "Interglossa", en kiu "Mi iris tien por fari ion" estas "Mi pre kine topo tendo un acte re", li estas tre kritika, sed li finas dirante, ke "ĝia ĉefa merito estas, ke ĝi denove atentigas pri la ĉiam pli urĝa neceseco de ilo por internacia komunikado."

★

Niajn kondolencojn: Al D-ro M. J. Plese de Florido kies amatan filon, Kapitano Thomas M. Plese, oni raportis kiel perditon en flugmisio super Germanujo. — Al S-ino Marŝa Gilbert, kies edzo Jack Gilbert mortis en la kampo de milito ie en la Suda Pacifiko. Tre kortuŝe Marŝa skribis, "Ie en la vasta spaco de la Pacifikaj Insuloj ripozas iom da Esperanto, ĉar la edziĝa ringo kiun Gilberto portis, estis gravurita Esperante."

Nova ano de EANA por la Eston-teco estas la nove naskita *Walter Leon Roessner*, filo de Leon A. Roessner. Paĉjo Roessner estis oficiala fotografisto ĉe la Klevlanda Kongreso, 1938.

★

Bona Esperantisto nun en la Filipinoj estas *Kaporalo John Lillevoid*. Antaŭe li loĝis en la ŝtato Minesoto, *Soldato Teo Crawford*, antaŭe de Kalifornio, informis nin ke li estas nun ie en Hindujo.

★

Daŭra subteno de Esperanto montriĝas en Ohio pro la nove ricevitaj abonoj por bibliotekoj de la sekvantaj samideanoj: *Ann E. Beatty*, Cardington, Ohio; *Prof. Frank Tomich*, Lakewood, Ohio; *Preston Davis, Jr.*, antaŭe de Columbus, Ohio, nun en la armeo.

★

"B7 parolas internacian lingvon!" estas la titolo de novaĵeto en la ĵurnalo de la Louis Pasteur Junior High School, Los Angeles, Kalifornio. Ne, oni ne skribas pri nova aeroplano, sed pri la ĉarma fraŭlino, *Dianto Chomette*, kiu estas studentino en la lernejo, klaso B7. Dianto estas Denaska Esperantisto, la filino de nia samideano Charles Chomette. La du filinoj, Dianto kaj Lilio, parolis Esperante antaŭ ol ili lernis la anglan lingvon, kaj nun Dianto bone propagandas Esperanton inter siaj geamikoj.

★

"España Libre" ("Libera Hispanujo"), hispanlingva semajna gazeto en New York, publikigas preskaŭ ĉiusemajne artikolojn de Generalo Julio Mangada pri Esperanto. La deka artikolo aperis la 16an de Februaro, kiam la gazeto ankaŭ publikigis gratulleteron ricevitan de S-ro William P. Vathis.

General Publicity Fund for Esperanto Promotion — Now

The American Esperantist has been advocating an extensive campaign to acquaint the people of the United States, and their leaders, with Esperanto. There is a vital interest in International Affairs; the people have become more language conscious; the idea of Interlanguage appears more often in the news.

Now is the time to strike! For this purpose the *American Esperantist* is establishing a General Publicity Fund, which will solicit funds to be used for the following purposes: to print extra copies of AE to be sent along with letters to important people in public life; for limited advertisements in newspapers, journals; for propaganda leaflets and letters. Besides direct donations the fund might well be helped by the organization of parties, gifts of books, and in many other ways. Names and amounts of donors will be published from time to time; also an accounting of the way in which the fund is used and the results secured.

A number of Esperantists have already sent in their donations — donations which will enable us to immediately start publicity activities: James H. Furay, \$50; A. S. Melli-champ, \$10; Dr. Lydia DeVilbiss, \$10.



S-ro James Vicary starigas nuntempe novan entreprenon sub la nomo, *Internacia Statistika Instituto*. Li utiligas Esperanton kiel ilon en Mond-Statistiko pri Publika Opinio. Li bezonas pli da nomoj el diversaj partoj de Usono — ankaŭ el Sud-Ameriko kaj la Okcidentaj Indioj. Se vi deziras senpagajn informon kaj demandaron, skribu al S-ro Vicary, 329 East 37 St., New York 16, N. Y.

DEZIRAS KORESPONDI

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 25 cendojn por 4 linioj. El aliaj landoj, de kie estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncojn senpage. La redaktisto rezervas al si la rajton fini tiun privilegion je iu tempo.

Al D-ro G. P. Ferree ni ŝuldas la eblecon malpliigi la koston de anoncoj. Li malavare donacis al AE sumon por subteni la korespond-fakon. Kelkaj aliaj ankaŭ donacis por eksterlandanoj: nome, Conrad Fisher kaj Tony Nabby.

Francujo. S-ro Louis Beaucaire, 9 Bd. Voltaire, Dijon (Cote d'Or), estas 19-j. studento. Li deziras korespondi kun junuloj amerikaj.

Usono. S-ro Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa., dez. kor. kun Espistoj tutmondaj. Li interesiĝas pri flagoj, PM, PK. Esperanto-gazetoj, naciimnoj, personaj fotoj.

Kubo. S-ro Edvardo Morilla, Gervasio 107, Habana, estas junulo, interesiĝas pri scienco-fikcio, ĝeneralaj aferoj.

Anglujo. S-ro J.C.D. Smith, 59 Reynolds St., Burnley, (Lanc.), serĉas korespondant(in)on. Li estas 18-jara, kaj havas ankaŭ svedan amikon kiu deziras korespondi.

Australio. S-ino A. C. Hintze, 17 Mayfield St., Coburn N.13, Melbourne, volas korespondi kun la samideanoj tutmondaj. Malnova Esperantisto.

Anglujo. S-ro F. C. Bailey, 18A Booths Farm Rd., Great Barr, Birmingham 22A, estas farmaciisto, aĝo 37, deziras korespondi. Flankokupoj estas muziko, radio, poŝtmarkoj.

Argentino. S-ro Hector Herraez, Strato Adolfo P. Carranza 2438, Buenos Aires (Ciudad), estas 19-jara filozofi-studento, filatelisto kaj dez. interŝanĝi poŝtmarkojn.

Portugalujo. S-ro Jose B. Cordeiro, Rua Cidade da Horta 36B-36C, Lisboa, laboristo, 25-jara, dez. kor.

ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

- PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction .75c
- ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps .25c
- PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations .25c
- UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages \$4.00
- AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion .30c
- ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid *key*, with grammar, and considerable fundamental teaching .10c
- "LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings .15c or 2 for .25c
- "LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation. .10c or 3 for .25c
- EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages \$1.00
- STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best.
Paper covers .75c
- DICTIONARIES. Just received, Millidge \$3.50, Fulcher & Long \$2.50
- STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.
- INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center .45c
- HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.
- "LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto) \$1.25
- "ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns .45c
- "ESPERO" and "NAPOLAJ NOKTOJ". Songs on 10 in. Record \$1.00

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist". \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships. Total for all above, \$4.00.

I..... Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount)

.....
.....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

Extracts from the Report of the League of Nations on Esperanto, 1922: The following paragraphs, from pages 11 and 31 of the Report, are especially significant in connection with present discussions of Dumbarton Oaks and other Conferences of the United Nations.

"The Secretariat has been instructed to study the question (Esperanto) specially from a practical point of view, basing its enquiries on facts. . . . Esperanto is certainly the most widely spoken interlanguage in universal congresses and in gatherings of all kinds, in traveling, in international offices, and even in the theatre. This makes it a living language — a characteristic not possessed by any of the systems which are only written and not spoken."

"We have witnessed the case of the International Conference of Educational Authorities at the Secretariat of the League of Nations in which the debates were in Esperanto. We were much struck by the ease and rapidity with which delegates from all countries expressed their ideas and understood each other; moreover, the discussions were not interrupted by translations. As many as 32 speakers were heard at the same meeting and an amount of work was done in three days which might have taken 10 days to accomplish in an ordinary conference using several official languages."

Esperanto is the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages — not to take the place of their mother tongues.